

Sabine Fiedler

Universität Leipzig, Germanio / Germany

Kiel Esperantologio kontribuas aŭ povas kontribui al aliaj fakoj

Resumo: Esperantologio estas lingvistika disciplino pri la esplorado de Esperanto. Same kiel ĉe aliaj filologioj, Esperantologio ne nur okupiĝas pri la lingvo (el morfologia, semantika, sintaksa, frazeologia, pragmatika kaj aliaj perspektivoj), sed studas krome nelingvajn temojn, kiel ekzemple la parolkomunumon kaj literaturon de Esperanto. Menciindas, ke rilate al planlingvoj tia disciplino nur ekzistas por Esperanto, t.e., ne estas Volapukologio, Idologio, kio jam multon eldiras pri la evolustato de Esperanto. Plenrajta funkciado de Esperantologio kiel fako mankas en universitatoj, sed montriĝas, ke la disciplino faras multspecajn kontribuojn al aliaj fakoj. Unue, tio rilatas al instruado. En Eŭropo ekzemple la pli kaj pli unueciĝantaj universitataj sistemoj instigas modulojn, en kiuj studentoj akiras sciojn ekster siaj propraj fakoj. Due, rilate al esplorado, montriĝas, ke sufiĉe granda nombro de verkoj, kiuj donas superrigardon pri lingvaj temoj, enhavas artikolojn pri Esperanto kaj planlingvoj. Tiu ĉi artikolo prezentas ekzemplojn pri tiuj evoluoj el la kampoj esplorado kaj instruado, kiuj montras, kiel Esperantologio povas fari kontribuon al aliaj fakoj.

Ŝlosilvortoj: Esperantologio; Interlingvistiko; Universitata instruado kaj esplorado; Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED).

1 Enkonduko

La unua parto de la 44-a Esperantologia Konferenco, en 2022, estis dediĉita al la 70-jariĝo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Sub la titolo “Bilancio pri la kontribuoj de Esperantologio al sociaj, politikaj kaj lingvistikaj fakdebatoj,” la datreveno estis okazo por prilumi la evoluon kaj nunan staton de Interlingvistiko kaj Esperantologio. La organizantoj petis min trakti la temon kiel Esperantologio kontribuas aŭ povas kontribui al aliaj fakoj. Tre volonte mi klopodis plenumi tiun taskon kaj faras tion ankaŭ el mia persona perspektivo post jardekoj de aktiva laboro en tiu fako. Ĉi tiu artikolo, verkita surbaze de mia prelego, pritraktas kelkajn el la temoj kiuj leviĝis dum la koncerna konferenco.

2 Esperantologio kiel speciala interlingvistika disciplino

Esperantologio estas disciplino pri la esplorado de Esperanto. Laŭ la strukturaj niveloj de la lingvosistemo ni povas distingi inter branĉoj kiel fonologio, morfologio, semantiko, sintakso, tekstolingvistiko, kaj pragmatiko. Same kiel ĉe aliaj filologioj, Esperantologio ne nur okupiĝas pri la lingvo, sed studas krome nelingvajn temojn, kiel ekzemple la parolkomunumon kaj literaturon de Esperanto.

Esperantologio estas parto de Interlingvistiko. Tio estas fako, kiun oni komprenis kaj difinis diversmaniere. Ampleksajn superrigardojn pri la diversaj aliroj donis Schubert (1989), Sakaguchi (1998), kaj Blanke (multloke, laste 2018). Mi tiujn ne volas ripeti. Malgraŭ ĉiuj diferencoj, esploristoj certe samopinias pri tio, ke la ĉefa esplorobjekto de Interlingvistiko estas planlingvoj. Se mi rajtas ĉerpi el la spertoj en Germanio: La germana faka societo Gesellschaft für Interlinguistik (GIL, Societo pri Interlingvistiko) havas sufiĉe vastan komprenon pri interlingvistiko kiel scienca fako kiu studas demandojn de internacia komunikado. Tio inkluzivas la rolon de diversaj lingvafrankaĵoj, ne nur de Esperanto kiel planlingvo. Laŭ nia interdisciplina aliro, krom lingvistikaj demandoj, ankaŭ kulturaj, ekonomiaj, kaj lingvopolitikaj aspektoj estas studataj.

Menciindas eble, ke rilate al planlingvoj tia speciala disciplino nur ekzistas por Esperanto, tio estas, ne estas Volapukologio, Idologio, kio jam multon eldiras pri la evolustato de Esperanto. El tiu vidpunkto, Esperantologio bone fartas. Ni ja ne forgesu la kondiĉojn, kiujn ni havas. Esploroj pri Esperanto kaj Interlingvistiko estas ĉefe farataj de specialistoj de diversaj (aliaj) fakoj aldone (aŭ libervole / honorofice / hobie – mem elektu la ĝustan vorton).

Ebla elirpunkto por prijuĝado de la evolustato de Esperantologio povas esti la superrigardo de Asya Pereltsvaig (2017), kiu montras, ke Esperantologio havas relative riĉan esplorpejzaĝon koncernante morfologion, fonologion, lingvotipologion, frazeologion, humuresploradon, pragmatikon, socilingvistikon, lingvonormigon (inkluzive terminologion), kaj lingvolernadon (Fiedler 2018).

Tiun evolustaton Esperantologio atingis ankaŭ danke al CED, kiu subtenas esploradon (per subvencioj kaj organizaj strukturoj, kiel ekzemple la Esperantologiaj Konferencoj kaj Nitobe-simpozioj), subtenas universitatajn studprogramojn kaj eldonas la fakajn revuojn *Language Problems and Language Planning* kaj *Esperantologio / Esperanto Studies*. Kompreneble, kompare al aliaj filologioj kaj fakoj tamen la esplorpejzaĝo de Esperantologio havas ege vastajn neprilaboritajn kampojn.


3 Esperantologio/ Interlingvistiko kiel fako inter aliaj

Mi volas trakti la temon kiel Esperantologio povas kontribui al aliaj fakoj rilate al la du taskoj, kiujn universitatoj plenumu kaj kiuj sub idealaj kondiĉoj formu unuecon: instruado kaj esplorado. Rilate al instruado, ni ne forgesu la elstarajn laborojn kaj atingaĵojn de Eötvös-Loránd-Universitato en Budapeŝto (Hungario), la kursojn pri interlingvistiko ĉe la Universitato de Amsterdamo (Nederlando), de Adam-Mickiewicz-Universitato en Poznań (Pollando) kun la Interlingvistikaj Studoj sub gvidado de Ilona Koutny kaj la bakalaŭra kurso pri Esperanto en la Universitato de Zaozhuang (Ĉinio), kie Esperantologio ja estas instruata kiel plena fako. Malgraŭ tiuj lumturoj ja estas fakto, ke Esperantologio mondscale ne estas plenrajta universitata studobjekto kiel ekzemple germanistiko aŭ japanologio. Tamen, laŭ miaj spertoj eblas, paŝon post paŝo, funkciigi Esperantologion / Interlingvistikon kiel fakon kaj samtempe kontribui al aliaj fakoj. En Eŭropo ekzemple la pli kaj pli unueciĝantaj universitataj sistemoj laŭ la Bologna-modelo¹ instigas modulojn, en kiuj studentoj akiras sciojn ekster siaj propraj fakoj. En la Universitato de Leipzig la nomo de tiuj moduloj estas “ŝlosilkvalifikoj”, en aliaj temas pri moduloj por “partoprenantoj de ĉiuj fakultatoj”. En la germana estas la esprimo “rigardi trans la telerrandon”. En aliaj lingvoj oni havas la bildojn de “postkurso” aŭ de “rigardo trans la nazopinton”. La celo de tiuj moduloj estas ekzakte tio: studentoj plivastigu siajn ĝeneralajn sciojn pri diversaj fakoj ekstere de la propraj studofakoj. Kaj tio estas ebla loko por Esperantologio.

En la Universitato de Leipzig tia modulo estis enkondukita antaŭ kelkaj jaroj (vidu bildon 1). La unuan fojon tia interlingvistika modulo okazis en la vintra semestro 2007-2008 kiel prova projekto, finance subtenita de Esperantic Studies Foundation (ESF), kiu regule kunlaboras kun CED. Raportoj pri tiu provprojekto aperis en Esperanto (Fiedler 2008a) kaj en la angla (Fiedler 2008b). La anglalingva modulo konsistas el tri elementoj.

- (1) Prelego (90 minuta, ĉiusemajna) pri problemoj de internacia komunikado kaj lingva justeco kun superrigardo pri la historio kaj nuna uzado de planlingvoj (“Linguistic Communication in Europe: Debates and Possible Solutions”);
- (2) Seminario (90 minuta, ĉiusemajna) (“The Multilingual Challenge”) pri lingvopolitikaj kaj kulturaj aspektoj de internacia lingvouzo kun fokuso pri la angla lingvo;
- (3) Lingvokurso de Esperanto (90 minuta, ĉiusemajna; nivelo B1).

1 La Bologna-procezo havas celon unuecigi la Eŭropajn universitatajn sistemojn por ke universitataj studoj fariĝu kompareblaj kaj akordigeblaj kaj gradoj fariĝu pli travideblaj. Fokuso de la reformo estis la enkonduko de laŭŝtupa studsistemo kun la gradoj Bakalaŭro, Magistro kaj Doktoro.



Bildo 1: Strukturo de interlingvistika modulo en la Universitato de Leipzig. Fonto: la aŭtoro.

Tiu modulo montriĝas aparte taŭga kiel universitata interlingvistika instruformo, ĉar ĝi kombinas la instruadon de teoriaj konoj pri la defioj de internaciaj lingvokomunikado kaj lingvojusteco kun praktika lernado de Esperanto.

Pro diversaj kaŭzoj (ĉefe manko de instrukapacito) la modulo ne estis daŭrigata dum kelkaj jaroj, sed en 2016, pro projekto pri multlingveco en Eŭropo (*MIME, Mobility and Inclusion in Multilingual Europe*), ekestis la ŝanco daŭrigi ĝin. Ekde tiu tempo ĝi estas daŭre en la universitata programo kaj en 2022 okazis jam la 7-an fojon. Aliĝis ĉiujare pli da studentoj ol ni povis akcepti kaj ili venis el la plej diversaj fakoj, tio estas ne nur el la lingvaj fakoj, sed diversaj socisciencoj, kiel kulturscienco, mediostudado, kaj politika scienco. Temas do pri ekzemplo, kiel Esperantologio / Interlingvistiko povas kontribui al aliaj fakoj. Krome mi mencias ĝin, ĉar laŭ mi tiu instruformo estas transigebla al aliaj Eŭropaj universitatoj, kiuj laboras laŭ la reguloj de la Bologna-modelo. Moduloj kun laborŝarĝo de 300 horoj por 10 poentoj ja prezentas kutiman strukturon en multaj universitatoj en Eŭropo.

Niaj laboroj en universitatoj kompreneble ĉiam dependas de la konkretaj kondiĉoj, kiujn ni trovas. Ĉiukaze bonas por ni havi la subtenon de organizo kiel CED je nia flanko.

Rilate al la dua tasko de universitatoj – esplorado – pro multjaraj spertoj mi venis al la konvinko, ke ĉiu faka artikolo en presperantologia fakrevuo

kaj libro pri la planlingvo kompreneble estas grava atingajo, sed ke estas ankoraŭ multe pli bone, kiam tiu aperas en la ekstera, neesperantista mondo – ekzemple en manlibroj pri diversaj temoj kaj lingvoj. Ankaŭ ĉirilate ni povas observi kelkajn sukcesojn. Ekzemple estas serio *Manlibroj pri Lingvistiko kaj Komunika Scienco* (*Handbücher zur Kommunikations- und Sprachwissenschaft / Handbooks of Linguistics and Communication Science*) de la eldonejo de Gruyter, kiu ludas gravan rolon en la senco, ke ili enhavas la ĉefan aŭ por kelkaj jaroj plej aktualan scion pri la koncerna fako. Estas ĝojinda afero, ke kelkaj inter tiuj enhavas ĉaptitrojn pri Esperanto aŭ planlingvoj:²

- Vol. 3 (*Soziolingvistik / Sociolinguistics*), Part 1 (1987): Alicja Sakaguchi, *Welthilfssprachen*, p. 365-370; Part 2 (1988): Pierre Janton, *Plans for an International Language*, p. 1679-1687;
- Vol. 5 (*Wörterbücher / Dictionaries*), Part 3 (1991): Reinhard Haupenthal, *Lexikographie der Plansprachen*, p. 3120-3137;
- Vol. 7 (*Sprachphilosophie / Philosophy of Language*), Part 2 (1996): Vivian Salmon, *The Universal Language Problem*, p. 916-928;
- Vol. 12 (*Kontaktlinguistik / Contact Linguistics*), Part 1(1996): Otto Back, *Plansprachen*, p. 881-887;
- Vol. 13 (*Semiotik / Semiotics*), Part 4 (2004): Peter Mühlhäusler, *Universal Languages and Language Planning*, p. 3614-3634;
- Vol. 14 (*Fachsprachen / Languages for Special Purposes*), Part 1 (1998): Detlev Blanke kaj Wera Blanke, *Plansprachen als Fachsprachen*, p. 875-880;
- Vol. 17 (*Morphologie / Morphology*), Part 2 (2004): Detlev Blanke, *Plansprachen*, p. 1563-1573;
- Vol. 18 (*Geschichte / History of the Language Sciences*), Part 1 (2000): Jaap Maat kaj David Cram, *Universal Language Schemes in the 17th Century*, p. 1030-1043;
- Vol. 20 (*Sprachtypologie und sprachliche Universalien / Language Typology and Language Universals*), Part 1 (2001): Heiner Böhmer, *Künstliche Sprachen und Universal Sprachen*, p. 85-94;
- Vol. 21 (*Lexikologie / Lexicology*), Part 2 (2005): Detlev Blanke, *Wortschatzbesonderheiten in Plansprachen*, p. 1101-1107;
- Vol. 28 (*Phraseologie / Phraseology*), (2007): Sabine Fiedler, *Phraseology in Planned Languages*, p. 779-788;
- Vol. 40 (*Wortbildung / Word Formation*), Part 3 (2015): Klaus Schubert, *Word Formation and Planned Languages*, p. 2210-2225.

2 Menciendas krome du Routledge-manlibroj kun ĉapitroj pri interlingvistiko (Fiedler 2021, aperos).

La traktado de Esperanto en tiaj verkoj sendas la signalon, ke temas pri vera lingvo, unu lingvo inter aliaj, lingvo, kiun oni agnoskas kiel plenrajtan lingvon. Mi krome ŝatas mencii terenojn, kiel ekzemple kulturhistorion, oftecvortarojn, sekson / genron, la kampon de minoritataj lingvoj, en kiuj similaj evoluoj observeblas. Kiam artikolo pri genro en Esperanto aperas ene de niaj medioj, ĝi verŝajne ĉefe atingas homojn, kiuj jam okupiĝas pri Esperanto. Kiam ĝi aperas en la angla aŭ la germana en ĝenerala manlibro kune kun aliaj artikoloj pri aliaj lingvoj, ĝi pli facile atingas ne-esperantistan legantaron kaj krome montras, ke la planlingvo estas lingvo kiu meritas seriozan studadon kaj, aldone, ke por la individuaj specialistoj de la fako, ke ili sciu ion pri la fenomeno Esperanto, ke alie ilia scio ne estas kompleta.

4 Konkludo

La superrigardo pri Esperantologio / Interlingvistiko en tiu ĉi artikolo ĉefe baziĝas sur propraj spertoj kaj tute ne estas kompleta. Ĝi tamen montras, ke la fako bone evoluas kaj povas ludi gravan rolon rilate du kampojn, kiuj estas ĉefaj laborterenoj de CED – esplorado kaj universitata instruado. Esperanto estas plene funkcia kaj diverscele uzata lingvo (Fiedler kaj Brosch 2022) kaj tial “estas egale merita je studado kiel ĉiuj aliaj lingvaj fenomenoj” (Tonkin 2022: 93). Ni daŭrigu nian laboron enigi ĝin en ĝeneralajn prilingvajn diskutojn kaj verkojn, kiuj donas superrigardon pri lingvaj temoj. Tiamaniere Esperantologio / Interlingvistiko estos rigardata kiel ordinara fako, kiu kapablas fari kontribuojn al aliaj fakoj kaj Esperanto kiel fenomeno kia ĝi estas: lingvo, kiu vere estas uzata kaj socilingvistika realaĵo.

Bibliografio

- Blanke, Detlev. 2018. *International Planned Languages. Essays on Interlinguistics and Esperantology*, redaktis Sabine Fiedler kaj Humphrey Tonkin. New York: Mondial.
- Fiedler, Sabine. 2008a. “Interlingvistiko / Esperantologio kiel fako en universitatoj: Spertoj el Leipzig.” *Informilo por interlingvistoj* 65 (2): 2-25.
- Fiedler, Sabine. 2008b. “Interlinguistics and Esperanto studies at universities. Experiences of a project in Leipzig”. *Language Problems and Language Planning* 32 (3): 269-279.
- Fiedler, Sabine. 2018. “La nuna stato de studoj kaj esploroj en Esperanto kaj Interlingvistiko.” Referaĵo prezentita dum la 7-a Nitobe-Simpozio, Universitato de Lisboa, Lisboa, 04 Aŭgusto 2018. https://interlingvistiko.net/wp-content/uploads/2021/05/Nitobe-Prelego-Fiedler_Nitobe_2018.pdf

- Fiedler, Sabine. 2021. "Literary Translingualism in Esperanto". En *The Routledge Handbook of Literary Translingualism*, redaktis Steven Kellman kaj Natasha Lvovich, 113-125. London kaj New York: Routledge.
- Fiedler, Sabine. (aperos). "Planned languages". En *The Routledge Handbook of Language Policy and Planning*, redaktas Michele Gazzola, François Grin, Linda Cardinal, kaj Kathleen Heugh. London: Routledge.
- Fiedler, Sabine kaj Cyril Brosch. 2022. *Esperanto – Lingua Franca and Language Community*. Amsterdam kaj Philadelphia: John Benjamins.
- Pereltsvaig, Asya. 2017. "Esperanto linguistics: State of the art." *Language Problems and Language Planning* 41 (2): 168-191.
- Sakaguchi, Alicja. 1998. *Interlinguistik: Gegenstand, Ziele, Aufgaben, Methoden*. Frankfurt am Main: Peter Lang.
- Schubert, Klaus. 1989. "Interlinguistics: Its aims, its achievements, and its place in language science." En *Interlinguistics: Aspects of the Science of Planned Languages*, redaktis Klaus Schubert, 7-44. Berlin kaj New York: de Gruyter.
- Tonkin, Humphrey. 2022. "Esperanto: Esploraj prioritatoj". *Esperantologio / Esperanto Studies* 3 (11): 86-107.

Pri la aŭtoro

Sabine Fiedler estas profesoro pri lingvistiko en la Universitato de Leipzig (Germanio). Ŝi doktoriĝis en 1986 per disertacio pri angla faklingvo kaj habilitiĝis en 1999 en ĝenerala lingvistiko per studo pri la frazeologio en planlingvoj. Ŝiaj esplorterenoj estas frazeologio, interlingvistiko/planlingvoj, komunikado per lingvafrankao, tradukscienco kaj humurstudoj.

Retadreso: sfiedler@uni-leipzig.de

ORCID-numero: 0000-0003-4622-3544

About the author

Sabine Fiedler is a Professor of Linguistics at the University of Leipzig (Germany). She holds a PhD in English linguistics (1986) and a second degree (Habilitation) in general linguistics (1999). Her research interests include phraseology, interlinguistics/planned languages, lingua franca communication, translation studies and humour research.

Über die Verfasserin

Sabine Fiedler ist Professorin für Sprachwissenschaft an der Universität Leipzig. Sie hat 1986 mit einer Arbeit zur englischen Fachsprachenforschung

promoviert und sich 1999 mit einer Studie zur Phraseologie in Plansprachen habilitiert. Zu ihren Forschungsgebieten gehören Phraseologie, Interlinguistik/Plansprachen, Lingua-franca-Kommunikation, Übersetzungswissenschaft und Humorforschung.

How Esperanto Studies can contribute to other subjects

Abstract: Esperanto Studies (Esperantology) is a linguistic discipline for the study of Esperanto. Like other philologies, it not only deals with language (from morphological, semantic, syntactic, phraseological, pragmatic and other points of view), but also studies non-linguistic topics, such as the speech community and the literature of Esperanto. It is also worth mentioning that, with regard to planned languages, there is such a discipline only for Esperanto, i.e., there is no Volapuk-ology, Ido-logy, which already says a lot about the state of development of Esperanto Studies. Esperanto Studies is not an equal subject at universities, but it can make a variety of contributions to other subjects. Firstly, this concerns teaching. The increasingly standardised university systems in Europe encourage the establishment of interdisciplinary modules in which students acquire knowledge outside their own fields of study. Secondly, with regard to research, a relatively large number of handbooks on linguistic and other topics contain articles on Esperanto and planned languages. This article provides examples of these developments in research and teaching, illustrating how Esperanto Studies can also contribute to other subjects.

Keywords: Esperanto Studies (Esperantology); Interlinguistics; Teaching and research at universities; Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED).

Wie die Esperantologie einen Beitrag zu anderen Fächern leisten kann

Zusammenfassung: Die Esperantologie ist eine sprachwissenschaftliche Disziplin zur Erforschung des Esperanto. Wie andere Philologien auch beschäftigt sie sich nicht nur mit der Sprache (aus morphologischer, semantischer, syntaktischer, phraseologischer, pragmatischer und anderer Sicht), sondern studiert außerdem nichtsprachliche Themen, wie z.B. die Sprechergemeinschaft und die Literatur des Esperanto. Erwähnenswert ist auch, dass es im Hinblick auf die Plansprachen eine solche Disziplin nur für das Esperanto gibt, d.h. keine Volapükologie, Idologie, was bereits viel über den Entwicklungsstand der Esperantologie aussagt. Die Esperantologie ist kein gleichberechtigtes Fach an Universitäten, kann aber vielfältige Beiträge zu anderen Fächern leisten. Dies betrifft erstens die Lehre. Die sich in Europa zunehmend vereinheitlichenden universitären Systeme regen zur Einrichtung fachübergreifender Module an, in denen Studierende Wissen außerhalb ihrer eigenen Studienfächer erwerben. Zweitens zeigt sich bezüglich der Forschung, dass eine rela-

tiv große Anzahl von Überblickswerken zu sprachlichen Themen Artikel über Esperanto und Plansprachen beinhalten. Der vorliegende Artikel zeigt Beispiele für diese Entwicklungen aus den Bereichen Forschung und Lehre, die veranschaulichen, wie die Esperantologie auch einen Beitrag zu anderen Fächern leisten kann.

Schlagworte: Esperantologie; Interlinguistik; Universitäre Lehre und Forschung; Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED).